

al la medicina etiko). Tiel la esploroj kun praĉeloj kaj klonado kontribuos al la progreso de medicina scienco.

Resumo

La aŭtoro raportas pri la unua stadio de esploroj kaj rezultoj rilate al uzado de praĉeloj en medicino. Samtempe li priskribas metodojn, akiri praĉelojn helpe de klonado. Li atentigas ankaŭ pri la danĝeroj okaze de praktika aplikado de la eksperimentoj.

La plej grava afero estas, ke la uzado kaj klonado de praĉeloj estu laŭleĝe normigita en ĉiuj ŝtatoj, kontribuantaj al progreso de la medicino.

Referencoj

- (1) Informoj de pluraj komisionoj de Usona Scienca Akademio, 2001, rilate al esploro de praĉeloj kaj klonado.
- (2) Informo de la Universitato Stanford, Usono, *Institute for Cancer / Stem Cell Biology and Medicine*, en 2002 (estro: Prof. Irving Weissman).

Adreso de la aŭtoro

Dr. Gabór LÁZÁR
Str. Stefan cel Mare 26/A
RO 525-200 Covasna
România - Rumanio

Priaŭtora informo

La aŭtoro estas emerita ĉefkuracisto, kunlaboranto de la esperantlingva medicinsciencia Medicina Internacia Revuo (MIR), de revuo BAZARO en Rumanio, kaj ekde 1960 redaktisto de la medicinsciencaj rubrikoj, kiuj aperis kaj aperas nacilingve en Rumanio.

D-ro Lázár estas gajninto de la *Shinoda*-premio de Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA) en 1984 pro sia agado en kadre de UMEA, kaj krome publikigis artikolojn pri la historio de la Eo-movado en Rumanio.

(Mal)planlingveco de la scienca leksiko en Esperanto

Josef KAVKA

Enkonduko

Sciencisto, kiu strebas, ke la zamenhofa lingvo grave rolu en liaj profesiaj agad-sferoj, sendube inklina al ties planlingva (ne arbitre ĥaosa) leksiko, almenaŭ tia, kia estas atingita en internaciaj sistemoj de terminologio kaj nomenklaturado.

Estas evidente, ke tiaj sistemoj ne povas kontentiĝi pri la vorttrezoro fundamenta, siatempe bone servinta al komunikado praktika, sed ne tre ambicia. Tiam Esperanto fascinis siajn adeptojn per la genie simpla gramatiko, malkaŝanta la neprajn avantaĝojn de la planlingvo kompare kun lingvoj "naturaj". Bedaŭre, la planlingvecon de Esperanto ne sukcesis konservi la posteuloj de *Zamenhof*, kiuj fosis siajn sulkojn sur la kampo leksika: baldaŭ montriĝis ties konsiderinda malkohereco, eĉ okulfrapa sensistemeco, kiuj ĝenas precipe en la tekstoj strikte sciencaj. Tamen, tiaj escepte devas rezigni eĉ pri kelko da vortformoj fundamentaj, lasante ilin por uzado stile laika, eventuale populariga.

Delfeno – delfino

1. Jen almenaŭ unusola ekzemplo, kiu konvinke pruvas, ke jena fundamenta vorto apenaŭ havas ŝancon aplikiĝi en strikte scienca teksto:

1.1. La malgranda cetaco *Delphinus*, fundamente "delfeno", devas akcepti la pli internacian formon "delfino" (angle *dolphin*, ĉeĥe kaj slovake *delfin*, france *dauphin*, germane *Delphin*, greke *delfis*, genitive *delfinos*, hispane, hungare, kroate, pole kaj slovene *delfin*, ruse *delfin* k.t.p.). Eble estus superflue mencii pli da lingvoj, kies **I** diverĝas de la fundamenta **E**.

1.2. La saman nomon portas unu el la borealaj konstelacioj kaj unu el la sportaj stiloj de konkura naĝado. Evidente, la problemo ne tuŝas sole zoologion...

1.3. Ree al la zoologia nomenklaturado. Delfino apartenas al la familio de delfinedoj (*Delphinidae*) kaj al la subfamilio de delfinenoj (*Delphininae*). Krome ekzistas alia cetaca genro delfinaptero (*Delphinapterus*): temas pri la ĉarma "hela baleneto".

1.4. Laŭ la delfino, la botanika nomenklaturado enkondukis la genronomon delfinio (*Delphinium*). Ĉi-okaze estas laŭdirinde, ke la botanika redakcio de NPIV (2002) ne aŭdacis trudi la misan formon "delfenio", por resti konforma al la fundamenta "delfeno", sed akceptis la supran neoficialaĵon kun I, spite al E. Sed la kohereco inter delfino kaj delfinio konsistas en tio, ke la florbουργono de delfinio laŭforme aspektas delfinece...

1.5. Temas ankaŭ pri ĥemio: la alkaloidon **delfinino** oni ekstraktas el delfinio. Aliflanke, **delfinidino**, pigmento ligita al saĥaridoj, kaŭzas la ruĝan koloron ekz. de vinberoj. Sendube neniu organika ĥemiisto aŭdacus – spite al la absolute internacia nomenklaturado – lanĉi la misformojn "delfenino" kaj "delfenidino"...

1.6. Apolono (la zamenhofa nomformo), la dio de lumo, havis la kromnomon *Delphinios*. *Delphinion* estis templo de Apolono kaj samtempe kastelo sur la insulo Ĥio, proksime al la bordo malgrandazia.

1.7. La zooteknika termino delfinario, kiun homonim-fobio povus interpreti muzike: delfin-ario, certe povas havi sian laikan ekvivalenton "delfenejo".

Resume eblas diri, ke nia Majstro siatempo havis bonan motivon por "delfeno", ĉar li deziris eviti koincidon de la IN radikfina kun la sufiksa. Tiam li certe ne kapablis antaŭvidi venontajn sistemojn de internacia terminologio. Eĉ nuntempe nenio malhelpas, ke "delfeno" aperu ekz. en poemoj pro rimo, pro rimado...

Arkivo – arĥivo

2. Jena dua ekzemplo demonstru, ke ankaŭ nia saĝa Akademio de Esperanto "sukcesis" **oficialigi** nomformojn, kiuj ne taŭgas el la vidpunkto terminologie planlingva.

2.1. "Arkaika" evidente obeas la fonetismon nek de la fontlingvo, nek de la vortoj fundamentaj, do la situacio aspektas tute mala ol okaze de la ekzemplo unua; tamen la malplanlingva rezulto restas same malbonŝanca por la scienca leksiko de Esperanto. Same oficialaj estas "arkaismo, arkeologio, arkitekt(ur)o, arkivo".

2.2. Nu, ni esploru la situacion alilingvan, ekz. pri la laste nomita "arkivo". La parentezaj majuskloj indikas la koncernajn prononcojn, sed ĉi-okaze necesas emfazi, ke la grafisma aspekto rolas multe pli grave ol la prononco, se temas pri terminologie normigaj principoj: ekzemple servu la eŭropa mon-unuo **eŭro**, nek *oro*, nek *juro*, nek *ojro*, nek *evro*, nek aliaj prononcoj, **sed la grafismo rolas**. Do: angle *archives* (**K**), ĉeĥe kaj slovake *archív* (**H**), france *archives* (**S**) germane *Archiv* (**H**), hispane *archivo* (**Ĉ**), itale *archivio* (**K**), kroate kaj slovene *arhiv* (**H**), pole *archiwum* (**H**), ruse *архив* k.t.p.

2.3. Nun ni revenu laŭvorte al la komenco = greke *arĥe*. Nia Majstro prave obeis la prononcon fontlingvan, kiam li enkondukis la fundamentajn vortojn **arĥitekturo**, **monarĥio** kaj aliaj. Por resti ĉe la ĵus nomitaj, NPIV (2002) ilin registras, sed referencas al la kapvortaj **K**-formoj, kie troviĝas la koncernaj difinoj. Memkomprene, ĉiuj **K**-formoj, ĉu oficialaj, ĉu neoficialaj, nenifoje referencas al la **H**-formoj, kiuj bone kongruas kun la fonetismo laŭfundamenta. Ni ripetu: jen situacio tute mala ol okaze de la "delfeno" kaj "delfinio", sed same sen ajna inklinado al terminologio planlingva.

2.4. Konsekvence, kulpe de nia Akademio, la Esperanto-vortaroj estas inunditaj de kontraŭfundamenta fonetismo: "arkeoj, arkeologio, arkeopterigo, arkeozoiko, arketipo, arkipelago, arkipteroj" kaj tiel plu, por mencii almenaŭ kelkon da nomoj, komenciĝantaj per **A**. Escepte ekzistas vortaroj, kiuj klopodas registri ambaŭ formojn (**H** kaj **K**), ekz. *Kraft* (1998). *Bokarev* (1974) klare preferas **H**: ark- *cm*. arĥ-; tiu *cm*. signifas *smotri* = vidu. Konklude: pri **H** kaj **K** en la scienca leksiko de Esperanto regas ĥaosso ne deca por planlingvo.

Rektumo - rekto

3. Se – escepte – iu fundamentaĵo ne taŭgas por scienca uzo, se – multnombre – oficialaĵoj kaŭzas la ĵus menciitan ĥaosson, en oftegeaj okazoj ĝi validas pri nomoj neoficialaj. Ree ni limigu nin per unusola ekzemplo:

3.1. "Rektumo" (latine *rectum*) estas laŭ NPIV (2002) la lasta parto de la dika intesto, kvankam la fundamentaj adjektivo **rekta** kaj substantivo **rekto** trafe elvokas la **formon de la intestoparto**. Kial do rekto ne servu ankaŭ anatomie, apud la nocio geometria?

3.2. La neŭtran finaĵon **UM** de la latina deklinacio *Zamenhof* neniĝo konsideris kiel radikparton. Ekzemple la substantivon *verbum* li esperantigis **verbo**, ne "**verbumo**", ĉar li sciis, ke ankaŭ la ceteraj lingvoj apogas lian procedon: angle kaj rumane *verb*, germane *Verb* (tamen ankaŭ *Verbum*), france *verbe*, itale, hispane kaj portugale *verbo*.

3.3. Ke tiu **UM** ne apartenas al la radiko nepre montras la derivaĵoj: **rektalgio** (doloro de la rekto), **rektotomio** (ĥirurgia forigo de la rekto), **rektitido** – laŭ NPIV "rektumito" – (inflamo de la rekto), **rektoskopio** kaj rektoskopo (laŭ NPIV "rektumoskop(i)o", spite al la tutmonde kodigita terminologio!), **rektostenozo** (mallarĝiĝo de la rekto), **rektostomio** (ĥirurgia elkonduko de la rekto).

3.4. Mankas loko por elnombri ĉiujn neoficialajn **UM**-aĵojn el medicino, ĥemio kaj aliaj sciencoj. NPIV (2002) aplikas tiaspecajn misformojn tute arbitre. Por teni sin en anatomio, oni komparu du ostojn: la zamenhofan sakro (*os sacrum*) kun la NPIVa "sternumo" (*sternum*). Ĉu sufiĉas? Por pliaj detaloj, interesato turnu sin al *Kavka* (1996, 2003).

Referencoj

- Bokarev E.A.* (1974). Esperanta-rusa vortaro. 288 p. – Soveta Enciklopedio. Moskvo.
Kavka J. (1996). Kontribue al PIV. Homonimoj en Esperanto, konsiderataj nomenklature. 32 p. – *KAVA-PECH, Dobřichovice*.
Kavka J. (2003). Scienca Vortaro de Esperanto (akompane al "La nova PIV 2002"). Scienca Revuo, Vol. 54, Kajero 1, 56 p. – *Eschwege*.
Kraft K. (1998). *Ĉesko-esperantský slovník*. 496 p. – *KAVA-PECH, Dobřichovice*.
 NPIV (2002). La Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (2002). 1264 p. – Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), *Paris*.

Adreso de la aŭtoro

Dr. Josef KAVKA
 Lužná 7 – Vokovice
 CZ – 160 00 Praha 6 / ĈEĤIO

Priaŭtora informo

Profesia petrologo, emerita sciencisto, multfaka naturscienca spertulo kaj profundkora esperantisto.

Bazaj scioj pri Esperanto-Literaturo*

I. La unua periodo inter 1887 kaj 1918

Peter ZILVAR

Lingvo, literaturo kaj kulturo

Ofte la Esperanto-movado (tute egale kiel oni difinas ĝin kaj ĉe ĉiaj elastecaj kaj ĉe specialaj elformiĝoj) neglektas „niajn kulturajn radikojn“. La literaturo nepre apartenas al Esperanto. Ekzemple la studfako **anglistiko** tute ne estas imagebla sen la anglalingva literaturo. Ĉe seriozaj universitataj studfakoj pri Esperantologio aŭ Interlingvistiko inter aliaj la literaturo nepre apartenas al la deviga studado. Feliĉe Esperanto disponas pri relative granda kultura agado dum la pli ol centjara historio.

En ĉiuj kontinentoj ekzistis kaj ekzistas valoraj kulturaj kontribuoj. Certe oni ne povas detale priskribi tion sur nur kelkaj sciencrevuaj paĝoj. En Brazilo aperas la kultura magazino „Fonto“, en Ruslando (nun en la urbo Kaliningrado) „La Ondo de Esperanto“, kaj en Svislando „Literatura Foiro“. Ofte aperas en „niaj kulturaj magazinoj“ ankaŭ prozo aŭ poemoj el la 1-a epoko de la Esperanto-literaturo.

Kutime la „Esperantaj civitanoj“ legas aktualajn romanojn. Granda parte temas pri tradukoj el etnolingvoj de elstaraj naci(lingv)aj aŭtoroj. Bedaŭrinde la originala verkado ne tiom oftas, kvankam la esprimkapablo de Esperanto havas tre grandan, eĉ neelĉerpeblan potencialon. Krom la „hereditaj nacilingvaj trajtoj“, la Internacia Lingvo havas ja propran kreopotencialon, i.a. pro la afiksoj kaj logikaj derivebloj. Ĝi invitas al propra verkado kaj ofertas relative egalrajtajn kaj neŭtralajn bonŝancojn por ĉiuj homoj sur la vasta ter globo. Ĉiukaze la etnolingvoj kaj la literaturo koincidas kaj estas nepre kohera kunligataj.

* Dosiero por studentoj kaj observantoj pri "Klerigado por Esperanto-instruistoj kaj kursestroj" okaze de la 3-a studadsesio en *Herzberg am Harz*, la 2-an kaj 3-an de decembro 2000